# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo — majo 2015**


## DEK TRI MADRIDANOJ EN LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Inter la 1-a kaj 3-a de majo estis celebrita en Cullera (Valencilando) la 74-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu samtempe estis Valencia E-Kongreso, organizita de la Valencia Esperanto-Asocio. Partoprenis ĉirkaŭ 90 homoj, el diversaj hispanaj urboj, regionoj kaj komunumoj. Inter ili ni menciu la partoprenon de dek tri loĝantoj en la madrida regiono (se ni ne mise kalkulis).

Inaŭguris la kongreson la skabeno pri kulturo de la urbestraro, Mª Carmen Tormos, kiu kun la respondeculo de la LKK, Enric Baltasar, kaj la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, bonvenigis la kongresanojn. Ankaŭ salutis vizitantoj devenantaj el landoj ekster Hispanio, kaj membroj reprezentantoj de grupoj kaj asocioj landaj.


Por la interkona vespero vendrede, kongresanoj alportis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el siaj regionoj, kaj do ankaŭ el Madrido.

Turisma vizito okazis sabate matene, al la kastelo kaj kapelo situata en la supro de la apuda monto, kie kongresanoj ricevis ankaŭ tagastronomian lecionon. Plua vizito tra la stratoj de la urbo okazis dimanĉe matene. Kaj je la fino, kongresanoj havis okazon ĝui gviditan viziton al urbo Valencio.

La programon plenigis debatoj, ludoj, prelegoj, filmoj, muziko. Sabate nokte, post la komuna paela bankedo, la rege-kantisto Jonny M, kiu venis specife por la kongreso, koncertis por la esperantistoj, kaj eĉ dancigis la plej kuraĝajn.

Dum la kongreso okazis la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio, kiu renovigis parte sian estraron, kaj aldonis du madridanojn, Alex Escomu, kiel reprezentanton de la junulara sekcio, kaj Águeda Biurrun kiel vicsekretarion. Krom la kutimaj burokrataj decidoj, oni debatis kaj aprobis la agadplanon de HEF dum tiu ĉi jaro. Sin prezentis kandidato por la venonta kongreso, pri kio la HEF-estraro devos decidi dum venontaj semajnoj.

## LEGADO DE DONKIĤOTO




Kiel kutime dum la lastaj jaroj, esperantistoj partoprenis en la seninterrompa legado de Donkiĥoto en Círculo de Bellas Artes en Madrido, legante pecon en Esperanto.

Ĉijare legis David (*Frego*) kaj nia studanto kore-devena Heroo (Youngung Kim), ambaŭ tre serene kaj dum sufiĉe longa tempo. Ilin akompanis ampleksa grupo de esperantistaj amikoj, kiuj poste kune bierumis en apuda trinkejo.

La evento estis filmita, kaj verŝajne estos baldaŭ spektebla en la kanaloj de Jutubo.

## KULTURA VIZITO: ŜANĜO EN LA DATO

ATENTU: La grupa vizito al la centra sidejo de Banco de España en placo Cibeles, mendita de MEL, kiun ni anoncis en pasinta numero, estis akceptita, sed por dato pli frua ol anoncite. Nome, ĝi okazos la merkredon 6an de majo je la 17a horo.

Vizitontoj rendevuos ĉe la ĉefa enirejo en strato Alcalá, 10 minutojn antaŭ la komenchoro.

## RETA CENSO DE ESPERANTISTOJ

Ni kutimas diri al ĵurnalistoj ke ne ekzistas censo de esperantistoj. Tamen, de nun tio ne tute veras. Ĝi estas konstruata rete, kaj vi povas aldoni vian nomon kaj datumojn ĉe la adreso http://bit.ly/mapaESeo. Por ĉiuj detaloj, vizitu la paĝon kaj plenigu la simplegan formularon: http://bit.ly/mapaESeo-entra.

## HISTORIA DOKUMENTO

Dum ordigado de la sidejo aperis tre interesa dokumento historia, rilata al la madrida agado en la 50-aj jaroj, kaj kie ĉefrolis nia kara kaj aktiva Darío Rodríguez. Temas pri la skripto de la esperanta programo de Radio SEU je la jaro 1952.

Kiel li mem klarigis en la reta forumo esperanto_madride, li gvidis kelkajn ĉiusemajnajn programojn en Esperanto en tiu radiostacio kiu nur elsendis en kurta ondo. Ĉar la tiamaj internaciaj E-gazetoj informis pri ĝi, oni ricevis en la stacio plurajn atestilojn de la aŭskultado, eĉ oni ricevis unu el la Insuloj Lofoten (Norvegio). Sed la direktoro de Radio SEU komunikis al li pere de la historia parolisto Jesús Alvarez (patro de la samnoma nuna parolisto) ke li opinias ke tiuj atestiloj de aŭdado estas falsaĵo, kaj do Darío decidis ĉesigi la elsendojn.

## VIZITIS NIN

La 30an de marto denove vizitis la sidejon sinjoro Nan Youli, prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio.

La 27-an de aprilo venis al Madrido junulo el Belgio, Sammy.

## GRAVA POR ANOJ KAJ NE-ANOJ DE MEL

Ni rememorigas ke Esperanto-Liceo de Madrid (MEL) havas novan konton en banko ARQUIA Caja de Arquitectos. La numero de la konto estas: IBAN: ES66 3183 2800 1700 0132 8957.

Memoru ke ankoraŭ eblas fariĝi membro de la Liceo por 2015, kaj ke la kotizo estas nur 12 €.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30.

La sabata bailrondo, kiu kutime okazas en la unua sabato de la monato, estis prokrastita en majo, pro la okazigo de la hispana kongreso. Oni do kunvenos la 9-an de majo, je la 6-a vespere. Antaŭvidante belan veteron, ni rendevuos en la Parko de Retiro, apud la statuo al Ricardo Codorniu.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, aŭ la retan diskutejon pri ĝeneralaj esperantaj novaĵoj en Madrido http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En la socia reto, oni povas viziti du forumojn: tiun de Madrida Esperanto-Liceo, ĉe https://facebook.com/esperanto.madrid, aŭ la pli ĝeneralan por ĉio okazanta en Madrido https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.